




Magazine de l'association JEFO  
JEFO informas • Trimestriel • Juin-Août 1999 • n° 99/2 • 25 FRF

• ISSN : 265 3853 • Commission paritaire n°61005 • Supplément à Franca Esperantisto • Dépôt légal à parution •

## Partoprenu la Gastronomiajn Semajnfinojn de JEFO !

Dans ce numéro :

- ☺ **Exclusif !**  
Les photos des membres du nouveau Bureau et leur présentation.
- ☺ La suite des aventures des Robineau
- ☺ Les sites Internet en Espéranto
- ☺ 2 nouvelles rubriques !
- ☺ Et puis tout le reste ...



[www.esperanto.org/jefo](http://www.esperanto.org/jefo)  
Tout savoir sur J@fo

# JEFO

## JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO

*JeunEspéranto-France*

4bis, rue de la Cerisaie  
75004 PARIS  
www.esperanto.org/jefo  
ou ttt.esperanto.org/jefo

Direktoro de la eldono /  
Directeur de la publication :  
**Karine Texier**

Redaktorino / rédactrice :  
**Ludivine Delnatte**

Desegnoj / illustrations :  
**Henri de Sabates (p2)**  
**Ludivine Delnatte (aliloke)**

Fotokopiado kaj sendado /  
Photocopie et envoi :  
**Laurent Vignaud**

Kontribuis al tiu numero /  
Ont contribué à ce numéro :

**Yves Bachimont**  
**Ludivine Delnatte**  
**Alain Fagot**  
**Bruno Flochon**  
**Cédric Forgeau**  
**Latifa Idbouchmal**  
**Krayg**  
**Didier Loison**  
**Olivier Moreau**  
**Maryvonne Robineau**  
**Albert Sanson**  
**Karine Texier**  
**Rozenn Texier-Picart**  
**Magali von Blottnitz**  
Dankon al ĉiuj !

Fotokopiita komence de junio je 300 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO kaj ricevi regule tiun bultenon, plenigu kaj sendu la aliĝon en la centraj paĝoj.  
La artikoloj en *JEFO-informas* reliefigas la vidpunktojn de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO.  
Tamen JEFO permesas al si la rajton publiki aŭ ne tiujn artikolojn.  
Represaĵoj estas permesataj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro kaj ke JEFO estu informita.

*Photocopié début juin à 300 exemplaires. Pour adhérer à JEFO et recevoir régulièrement ce bulletin, remplissez et renvoyez le bulletin d'adhésion situé en pages centrales. Les articles parus dans JeunEspéranto Info n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve de l'indication de l'auteur et de la source et sur simple information à JEFO.*

ISSN : 265 3853

## Le mot de la présidente

Hallo, bonjour, hello, hola... Saluton Eŭropo!

La 9an de majo okazis en Francio la tago de Eŭropo, sed la 13an de junio estas nova okazo montri kian Eŭropon vi deziras.

Ne nur temas pri eŭropaj balotoj! JEFO-anoj faras pli ol ĵeti voĉdonilon en urnon. Tiam, pluraj el ni babilas, laboras kaj festegas esperante kun GEJ-anoj (GEJ estas la "germana JEFO"). Tiu franc-germana seminario celas interŝanĝi ideojn kaj (kial ne?) komenci kunlaboron.

Sed... Ĉi rilate... Kion vi faras ĉi tie?

Malfeliĉulo! Vi eĉ ne partoprenas! Ĉu vi ne legis la pasintan "JEFO Informas" (JeunEspéranto - Info)? Tiuokaze, nur vi kulpas! Aŭ ĉu vi eble opiniis ke nur deciduloj rajtas partopreni? Kompatinda! Vi ne legis sufiĉe bone!

Tamen, ne forgesu! Lastajn ŝancojn vi havos dum la somero. Ĉu apud Perpignan (Oliva Semajnfino), ĉu en Berlino (junulara programo de UK), ĉu en Hungario (Internacia Junulara Kongreso), ni atendos vin.

Post tiuj longaj laboraj monatoj, ankaŭ vi bezonas sunon, amikojn kaj distraĵojn, ĉu ne?

Do kontaktu vian regionan kunordiganton kaj... kio? Mi petas? Vi ne konas lin/ŝin? Nekredeble! Legu tuj paĝon 22 lian/ŝian telefonnumeron kaj alvoku lin/ŝin!

Li/ŝi iĝos via gardanta anĝelo en Esperantio.

Nepre rapidu!

JEFO-ane via,

Karine



HDS

## ENHAVO

Vorto de la prezidanto	2
Enkonduko	3
F&S Raporto	4
IJF Raporto	5
Vojaĝo	6
Raporto (dulingva)	8
Asocio	10
Aliĝilo	11
Jefo Butik'	13
Anoncoj	15
Legado	16
Scienco (dulingva)	17
Minitel	18
Retangulo	19
Korespondpetoj	20
Kalendaro	21
Adresaro	22

# Enkonduko

Salut à tous,

La Terpoma Semajnfino vient à peine de se terminer que se profile déjà à l'horizon l'Oliva Semajnfino. Les occasions de pratiquer l'espéranto ne manquent vraiment pas. Et pour s'entraîner avant une rencontre, rien de tel que de lire cette merveilleuse revue qui porte le nom de "Jeun-Espéranto Info"

Comme je vous l'avais promis la dernière fois, de nouvelles rubriques sont apparues : l'une concerne la littérature et propose différents textes à lire (une bonne façon de se perfec-


tionner), et l'autre propose quelques adresses de sites aux internautes, plus ou moins en rapport avec l'espéranto, mais qui de toutes façons méritent le détour.

Enfin, un message très important se trouve à la page 15 (j'aurais pu l'annoncer dans l'édito mais qui sait combien de personnes le lisent ?). Donc faites bien attention quand vous arriverez à cette page !

Voilà que dire de plus ? Je vous souhaite à tous de passer un très bon été, en espérant vous croiser dans l'une des nombreuses rencontres prévues cet été. Les français feront-ils partie des pays les plus représentés à l'IJK (Congrès International des Jeunes) ? Vous le saurez dans le prochain numéro...

En attendant, bonne lecture et faites attention aux coups de soleil !

Ludivine



## La Fromaĝa Semajnfino

La Fromaĝa Semajnfino okazis inter la 2a kaj la 5a de aprilo 1999 en Pierrefontaine-les-Blamont, apud Montbéliard.

Kiam ni alvenis vespere (Magali, Philippe kaj mi), ĉiuj parolis en Esperanto. Tio estis la unua fojo, kiam mi aŭdis paroli tiun lingvon, kiu apartenas al neniu sed kiun ĉiu povas lerni tre rapide, (mi lernis esperanton per interreta kaj koresponda kurso, kaj tial mi antaŭe aŭdis la lingvon nur sur miaj kasedoj aŭ el la buŝo de kunstudento Erwin). La Fromaĝa Semajnfino estis do kvazaŭ la unua fojo, ke mi aŭdis flue paroli tiun lingvon kaj estis mia unua esperantista renkontiĝo. Mi do havis problemojn por paroli ĉar la vortoj ne venis rapide ; sed iom

post iom, mi sukcesis kompreni tute kaj paroli, kaj mi estis tre feliĉa.

Dum tiu semajnfino, ni ne havis tempon por enui. Ni vizitis fromaĝojn kaj funsekigejon (ni eĉ povis aĉeti fromaĝon kaj kolbason), ni ĉeestis la prelegon pri la 8-jara mondvojaĝo de familio Robineau, kiu estis tre interesa ; ni ankaŭ ĉeestis distran muzikan vesperon kun Ĵak Le Puil kaj Jean-Luc Nougaret ; ni povis iri al la libroservo por aĉeti librojn (sed mi ne iris tien ĉar mi dormis tro longe); oni povis partopreni en la komunaj preparadoj de la manĝoj, lavi la manĝilaron, promeni tra la urbo Montbéliard, ludi (ekzemple SET ĝis tre malfrue en la nokto), kanti, ktp.

Mi devas diri, ke la receptoj vere sukcesis, kaj oni manĝis tre bone (ekz. terpoman salaton kun rokforto, maizajn krespetojn, kontean fonduon, tiramisuson, tomatojn kun ŝafina fromaĝo...).

Laurent fotis tre diversajn scenojn dum la semajnfino, kaj sendis al ni disketon kun la fotoj ; tio estis bona ideo ĉar nun oni havas memoron. Cetere, tiuj kiuj ne ricevis disketon, povas tamen vidi la fotojn en interreto : <http://perso.wanadoo.fr/esperanto/fromagxa2a.htm>

Mi konfesas, ke mi ne multe parolas en Esperanto, sed mi lernis multe, ekzemple aŭskulti la aliajn paroli ...

Fine de la Fromaĝa Semajnfino, mi estis tiel entuziasma, ke mi aliĝis al la Oliva Semajnfino (25-27 junio 1999) kun mia amikino Laure.

Mi do kuraĝigas iun ajn, kiu lernas esperanton, partopreni en tiaj renkontiĝoj por ne nur progresi pli rapide (paroli), sed ankaŭ por renkonti multe da gesamideanoj.

Latifa Idbouchmal



# Internacia Junulara Festivalo (IJF)

## Esplori kaj scii

Ĉu paska semajnfina universitato, ĉu diboĉa festego, tio estis la demando, antaŭ iri al la IJF – la internacie celata ĉefokazo de la itala junulara movado. Laŭ la programo "esperanto estas utila jam nun: oni ne bezonas atendi ĝis la fina venko por lerni altnivele per ĝi". Por realigi tion estis aranĝita plena programo de prelegoj – inter aliaj tri diplomonivelaj kursoj de la Akademio Internacia de la Scienco (la 'universitato de Esperantio' \*).

Kunvenis ĉ. 150 homoj ĉe turismega urbeto de la Adriatika marbordo, kie la germana verŝajne estas la dua lingvo (laŭ vendejo/hotelo-ŝildoj). Kaj germanoj sufiĉe abundis ankaŭ inter la IJF-ĉeestantoj, sed aliaj okcident-eŭropanoj ne. Estis mia unua renkontiĝo kie mi 'portis la francan flagon' – efektive mi estis la sola Francio-loĝanto (ĉu 'franciano'?). Simile amuze estis renkonti la solan (laŭnomŝilde) 'briton' \* – fakte hispano! (Sed tia estas esperantio, ĉu ne?)

Alvenis ankaŭ belega varma vetero, efektive tial la plej populara studofako estis plaĝartoj (ekz. mi portis tre maltro da pilkoj por la nombro de ŝonglontoj). Tamen ja multaj restis ene por la AIS – kursoj pri esperanta literaturo, lingvoakirado kaj komputila sekureco, kaj konstatante ke pluraj eĉ faris la ekzamenojn oni diru ke la provo miksi la studon kun la festo sukcesis. Aliaj seriozaj programeroj temis pri 'Kiel administri ŝanĝon', 'Al senaŭtaj urbejoj'\*, kaj 'Bariloj al Scienca

Disvolviĝo'. Priesperantaj sesioj traktis la interpreton, eblecon de 'presagentejo' kaj 'dialektoj en esperantio'. Tiuj sufiĉe altkvalitis por vekigi la cerbon kaj por vigligi la manĝejan etoson per postprelegaj diskutoj.

Novajo en la distra programo estis la 'aligatorejo'. Kiel divenebla de la nomo, tie oni devas aligatori \* - ĉiu portas nomŝildon kiu indikas la 'malpermesatajn' lingvojn (por tiu homo la esperanton kaj la gepatran) kaj la 'provindajn' – iuj kiujn li/ŝi iom scipovas. Amuza la ne malgranda proporcio da esperantistoj kiuj estas plurlingvaj; laŭ mi ĝi iĝos tiom tradicia kiom la Bamba.

Temante la lastan, mi opinias ke tempegas trovi novajn versiojn de ĝi, aŭ eble fari novan 'mikson' – ĉu iu leganto spertas pri tio kaj povus, ekzemple, intermiksi kisotemajn eltiraĵojn de aliaj kantoj, aŭ fari pli dancan version ... Vi eĉ povus vendi ĝin kaj tiel enspezi -vian tekilaomonon!

La koncerta vespero malsukcesis – tro frua kaj en salono kiu ne kreis taŭgan etoson. Tamen pozitive menciendaj estas la teatraĵo de 'Alia Koincido' – tre amuza kaj altnivela – kaj la ekskurso al San Marino. Tio estas sendependa ŝtato sur monto. Mi bedaŭras ke mi maltrafis tion: ĝi estis tre partopreninda laŭ la pribelecaj raportoj kaj la elportitaj kvantoj de malmultekostaj alkoholaĵoj!

Venontjare la IJF celos pligrandan okazon pro samtempo al ia itala jubilea jaro (mi forgesas kian). Kaj postvenontjare estos la 25a, do rezervu viajn paskajn feriojn tuj por certigi ke ĉeestos pliaj franc(i)(an)(emul)oj!

Krayg

\*\*\*\*\*

\* De 1985 la AIS proponas universitatecajn kursojn, konferencojn kaj ekzamenojn kaj kunordigas sciencajn esplorojn. Plejmulto el ĉio okazas en la Internacia Lingvo Esperanto. Por plia informo vidu <http://www.forst.uni-muenchen.de/OTHERS/AIS/>

\* La aŭtoro estas anglo loĝanta en Lyon.

\* Pri tiu ĉi la aŭtoro malneŭtralas kaj do devas nek laŭdi nek male. Sufiĉas diri ke nur unu aŭ du aŭskultantoj endormiĝis.

\* Aligatori – en Esperantio konversacii per lingvo (ne esperanto) kiu estas la gepatra lingvo de iu(j) sed ne de ĉiuj.



## Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo (dua parto)

*Vous vous souvenez ? Dans le précédent numéro, vous avez pu lire un résumé du livre de Maryvonne et Bruno Robineau, relatant leur voyage de 8 ans autour du monde, avec l'espéranto dans leurs bagages.*

*Actuellement, Maryvonne et Bruno sont en Roumanie. Néanmoins, par leurs notes de voyages, vous allez pouvoir ci-dessous connaître un peu mieux la vie dans les kibboutz israéliens.*

kibuco, Esther antaŭzorgas doni al mi fulardon por ŝirmi miajn harojn kaj Bruno kapvestas sin per kipo, la judara ĉapeto. "Por ne ŝoki iujn personojn" ŝi precizigas. Post la vespermanĝo, niaj gastigantoj montras al ni kiel meti la vazaron en la lavkuvojn disigante tiujn kiuj entenis viandon disde tiuj en kiuj estis servitaj la fromaĝoj. Efektive la juda tablo apartigas la karnajn manĝojn de tiuj kiuj konsistas el

laktaĵoj, starigante inter ili limon laŭ la jena principo : "Ci ne kuro la kapridon en la lakto de ĝia patrino" (Eliro 23-19).

Tiel, la tutan vivon de la enloĝantoj de Ein Zurim reguligas la bibliaj instruoj. "Ni kredas ke ĉio estis skribita de la rabenoj en la Talmudo kaj ni devas observi ĝiajn leĝojn se ni volas vivi kiel judoj obeantaj Dion" klarigas Schmulick. Publikigita en jaro 999 a.K. en la religiaj akademioj el

### IZRAELIO : La bredado laŭ la ritmo de la Sankta Skribo

Por ke la bibliaj leĝoj kongruu kun la bredado, la religiaj kibucoj montriĝas elturniĝemaj.

Vendrede vespere ĉe la kibuco Ein Zurim, ĉiuj klopodas por digne akcepti la ŝabaton: oni alivestiĝas, la domoj estas puregaj, oni fumas la lastan cigaredon, oni programas la horloĝojn kiuj ekfunkciigos la elektron, la virinoj akurate finkuiras la kukojn por la semajnfino. Jen aperas la ŝabata stelo : neni laboro ĝis paso de 24 horoj. Nek kuiri, nek skribi, nek lavi, nek fumi, nek telefoni, nek vojaĝi, nek ekbruligi fajron aŭ ŝalti la lumon.

Ein Zurim estas unu el la dek-ses religiaj kibucoj en Izraelio kaj, ĉirkaŭataj de siaj ses infanoj, Esther kaj Schmulick akceptas nin en sia hejmo. Antaŭ ol iri al la manĝosalono komuna al la tuta



Babilono, la Talmudo regas ĉiujn aspektojn de la ĉiutaga vivo. Tiel same ĝi traktas filozofion, kiel la edukadon de la infanoj.

Iuj izraelianoj riproĉas al la religiuloj, ke ĉi tiuj same vivas kiel antaŭ dumil jaroj. Unuavide, fondita en 1946, la kibuco Ein Zurim kun sia moderna uzino, siaj hangaroj ŝirmantaj agro-kulturan materialon ultra-perfektigitan kaj siaj agrablaj dometoj ĉirkaŭataj de ĝardenoj, neniel aspektas kiel vilaĝo el la biblia epoko. Ĉirkaŭ kvincent personoj venintaj de dudek-kvin landoj komune vivas tie, egalece dividante siajn havaĵojn kaj la fruktojn de sia laboro.

Sed ne ĉiam estas facile kombini la leĝojn de la Talmudo kun la postuloj de la moderna ekonomia vivo. Tiele la ŝabato starigas kelkajn problemojn al la agrokulturistoj. Forpuŝante ĉian ajn zorgon, la homo devas dediĉi tiun tagon al sia Dio, al sia familio, kaj ĉia ajn laboro estas malpermesata. Sed se povas atendi la tero, la bestoj bezonas zorgadon. Kaj la tricent bovinoj de Ein Zurim ne estas escepto, necesas ilin melki kiel kutime, po tri fojojn tage.

"Kompreneble, ni melkas la bovinojn dum la ŝabato ĉar la Talmudo preskribas ne lasi suferi la bestojn, sed tion ni faras laŭ maniero konforma al la Leĝoj." Por la melkado, la agrokulturistoj renkontis problemon pro la fakto, ke al ili estas malpermesate premi ŝaltilon por produkti elektron. Tial ili ekipis sin per programeblaj horloĝoj kiuj ĝustatempe startigas la melkomaŝinojn kaj aŭtomate haltigas ilin.

"Ĉiujn virseksan unuenaskiton de cia bovino aŭ de cia ŝafino vi dediĉos al cia Dio, Javeo. Ci ne laborigos la unuenaskiton de cia bovino. Ci manĝos ĝin kun ciaj samhejmanoj..." Tiel parolas la

libro de la Deuteronomo (15-19) en la Biblio, por sciigi al la homo kiu plugis, semis, kultivis kaj fieras pri sia rikolto ke sen Dio, nenio el tio eblas. Sed ĉiujare en la stalo de Ein Zurim naskiĝas preskaŭ centoj da unuenaskitaj bovidoj. Kion fari el ili? La rabenoj trovis solvon: la bovidinoj kiuj naksos sian unuan bovidon en la jaro estas fiktive venditaj al araba najbaro (ĉi tiu ricevas monsumon por efektiviĝi la "negocon"). Ili restas en la kibuca stalo sed ne plu estas submetataj al la talmudaj leĝoj.

"Pesah", la Pasko, estas unu el la gravaj momentoj de la juda vivo, memoriganta la Eliron el Egiptio de la izraelidoj, sub gvidado de Moseo. Tiun semajnon antaŭas intensa purigado de la domo por kontentigi la absolutan postulon de pureco dum la festo. Dum sep tagoj, oni konsumos nur panojn sen gisto, ne fermentitajn, simbolo de la renoviĝo kaj de la liberigo. Ĉar la bestoj devas esti regataj de la samaj reguloj, la melkadejo estas ĝisfunde purigita kaj oni malaperigas ĉiun spuron de tritiko el la nutrado de la bovinoj. "Iom post iom ni anstataŭigas per maizo, komencante la transiron ĉirkaŭ tri semajnojn antaŭ Pesah kaj grade revenas al la normala nutromaniero. Tiel ŝanĝante la nutradon de la bovinoj ofte okazas malaltiĝo de la laktoprodukto-kvanto. El tio ni perdas monon sed tio estas la prezo kiun ni konsentas pagi por vivi harmonie kun nia kredo" klarigas Schmulick.

Ĝisfunde frontantaj la teknikon kaj la rendimentojn, ili tamen neniam forgesas la vivregulojn de siaj praavoj, akordigante spiritan vivon kaj laboron: iliaj tagoj ĉiam komenciĝas kaj finiĝas en la sinagogo.

Maryvonne Robineau

## La kibucoj

Dum la unua kibuco estis fondita en 1910, ekzistas nuntempe 270 kibucoj nombrantaj de 40 ĝis pli ol 1 000 membrojn. 130 000 personoj, nome: 2,6 % de la totala enloĝantaro de Izraelio, elektis tiun komunuman vivmanieron.

El ili, nur 16 kibucoj (nome 8 000 personoj) estas religiaj kibucoj kiel Ein Zurim, postulante de siaj membroj ortodoksan kultobservon.

\*\*\*\*\*


Et, si vous voulez en savoir plus sur leur aventure, n'hésitez pas à commander leur livre, pour voyager avec les mots, pour rêver des horizons qu'ouvre l'espéranto (c'est également un très bon cadeau pour des non-espérantophones !):

(préciser "en français / en Espéranto") **"Et leur vie, c'est la terre - Huit ans de nomadisme autour du monde"** - **"Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo"**.

240 pages - 8 pages de photos couleurs

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau - FR-49270 Landemont  
Tel-Fax +33 (0)2 40 98 78 76 -  
Bruno.Robineau@wanadoo.fr

120 FRF + frais d'envoi : 20 FRF  
(France) - 30 FRF (aliaj landoj)



## Problèmes de traduction

Le samedi 14 novembre 1998, j'ai participé pour la première fois de ma vie à une grande rencontre internationale (1500 participants de tous les continents) où on n'utilisait pas l'espéranto. Depuis longtemps j'avais lu des récits sur les problèmes de traduction dans ces rencontres, mais j'ai maintenant pu en faire l'expérience moi-même. Pour ceux qui l'ont déjà vécu, ce récit paraîtra tout à fait ordinaire, mais j'aimerais tout de même vous en faire part.

La rencontre avait lieu à Paris, au Palais de la Mutualité, et était organisée par des associations chrétiennes de défense des droits de l'homme. Les deux tiers des participants environ étaient français, mais il y avait aussi des représentants de 30 pays d'Europe, d'Asie, d'Afrique et d'Amérique.

La plupart des discussions ont eu lieu en français, mais certains intervenants parlaient anglais. Les casques pour la traduction étaient distribués à l'entrée pour obtenir des traductions français-anglais, anglais-français, français-espagnol et anglais-espagnol. Bien sûr, on peut discuter le choix de ces langues, qui était loin de refléter la totalité des langues des participants.

Autre problème : une partie des personnes présentes, entre autres celles qui participaient au programme jeune le matin, n'étaient pas informées qu'il fallait demander ces casques à l'accueil. Pour moi ça n'a pas vraiment posé de problème, ma connaissance de l'anglais m'a permis de suivre les discussions.

L'après-midi a commencé par une table ronde en français. Je ne saurais dire si la traduction vers les autres langues a bien fonctionné, en tout cas s'il y a eu des incidents, les personnes concernées ont dû se sentir trop minoritaires pour réussir à les signaler. Ensuite, des intervenants sont venus parler de problèmes de réconciliation rencontrés dans leurs pays: David Stevens, Secrétaire du conseil des Eglises d'Irlande du Nord, Anna Bo, responsable d'une association humanitaire oecuménique en Voïvodine, et la présidente d'une association pour les droits des femmes au Rwanda.

Bien sûr David Stevens a parlé en anglais, et les Français se sont précipités sur leurs casques pour avoir la traduction. Au bout d'à peine une minute, une rumeur s'est élevée dans la salle : visiblement la traduction ne fonctionnait plus. Après quelques

## Tradukaj problemoj

Sabate la 14an de novembro mi partoprenis por la unua fojo en mia vivo grandan internacian kunvenon (1500 partoprenantoj el ĉiuj kontinentoj) kie oni ne uzis esperanton.

Mi jam delonge legis pri traduk-problemoj en tiaj kunvenoj, sed povis nun mem sperti ilin. Mi ŝatus rakonti, kvankam por tiuj kiuj jam ofte spertis tion, mia rakonto estos tute ordinara.

La kunveno okazis en Parizo (Palais de la Mutualité) kaj estis organizita de Kristanaj asocioj por homrajtoj. Mi dirus ke du trionoj de la partoprenantoj estis Francoj, sed venis ankaŭ delegacioj el 30 eŭropaj, afrikaj, aziaj kaj amerikaj landoj.

Plejparte la diskutoj okazis en la franca, sed kelkaj parolis en la angla. Ĉe la enirejo oni disdonis traduk-kaskojn per kiuj oni povis aŭdi tradukojn angla-franca, franc-angla, franc-hispana aŭ angla-hispana. Kompreneble oni povas diskuti pri la elekto de tiuj tri lingvoj (franca, angla, hispana)... kiu tute ne spegulis la diversecon de la lingvoj de la partoprenantoj.

Alia problemoj : parto de la ĉeestantoj (interalie tiuj kiuj partoprenis la junularan programon matene) ne estis informitaj pri tio, ke ili devas peti tiujn kaskojn ĉe la enirejo. Por mi ne gravas, ĉar mi sufiĉe bone komprenas la anglan lingvon.

La unua parto de la posttagmezo okazis nur en la franca, kaj mi tute ne povas diri, ĉu la tradukado al aliaj lingvoj bone funkciis. Ĉiukaze, se problemoj ekzistis, neniuj parolis pri ĝi ĉar la organizantoj estis ĉiuj francoj, kaj la koncernitaj homoj verŝajne sentis sin tro izolitaj por reagi. Poste venis homoj por rakonti pri reamikiĝaj problemoj : parolis David Stevens, sekretario de la Eklezia kunsido en Norda Irlando, Anna Bo, prezidentino de humanitaria interreligia asocio en Voïvodino (Serbio) kaj virino el Ruando (kies nomon mi absolute ne povas rememori) kiu estras asocion por rajtoj de virinoj.

Kompreneble, David Stevens parolis en la angla, kaj Francoj prenis sian kaskon por aŭdi tradukon. Post apenaŭ unu minuto, ekestis bruo inter la ĉeestantoj, kaj unu el la organizantoj signis, ke estis problemoj en la tradukado. Oni devis atendi ĝis ĉio reordiĝis.



minutes d'interruption le bon déroulement a été rétabli.

Arriva alors le tour d'Anna Bo. La présentatrice l'introduit : "Écoutons maintenant le témoignage d'Anna Bo, qui nous vient de Voïvodine, au Nord de la Yougoslavie..." Et la jeune femme monte sur le podium en protestant : "No, I'm not from Bosnia, I'm from Serbia !" ("Non, je ne suis pas de Bosnie mais de Serbie.") La présentatrice est confuse : "Mais enfin, ai-je dit Bosnie ? Qu'est-ce que j'ai dit ? Qu'est-ce que j'ai dit ?" L'assistance s'interroge... Sans aucun doute l'incident venait d'une erreur du traducteur français-anglais, qui avait traduit "Yougoslavie" par "Bosnia." Anna Bo n'a pas accordé beaucoup d'importance à cette erreur - elle venait parler de réconciliation inter-ethnique ! - mais dans un autre contexte, j'imagine qu'un tel incident aurait pu être explosif !

Anna Bo ne parlait sans doute pas un mot de français, et ne maîtrisait pas parfaitement l'anglais. Elle avait donc, contrairement aux autres intervenants, préféré rédiger son discours à l'écrit et le lisait d'une voix monocorde, qui a vite lassé l'assistance. Les questions de l'animatrice et ses réponses sont vite apparues complètement artificielles quand nous nous sommes rendu compte qu'elle se contentait de lire son papier. Finalement l'attention est retombée pour cette dame, victime du fait que sa langue nationale n'était ni le français, ni l'anglais.

Enfin, nous avons écouté le témoignage d'une Rwandaise, qui a reçu beaucoup plus d'applaudissements et de réactions que les précédents orateurs. Son récit était-il réellement plus intéressant ? Sans doute était-elle charismatique, mais je suis persuadée que la chaleur du public venait aussi du fait qu'elle parlait français, et que les Français (2/3 de l'auditoire) pouvaient la comprendre sans intermédiaire, et réagir tout de suite à ce qu'elle disait, alors que dans le cadre de la traduction simultanée, il y a toujours un délai entre la parole prononcée et la fin de la traduction, qui empêche une réaction aussi spontanée.

Rozenn


La fino de la parolado de David Stevens estis normala, ŝajne.

Poste venis Anna Bo. Presentantino klarigis : "Nun venas Anna Bo, el Voïvodino, norde de Jugoslavio..." Kiam la virino alvenis sur la podio, ŝi tuj protestis : "No, I'm not from Bosnia, I'm from Serbia." ("Ne, mi ne estas el Bosnio sed el Serbio.") La presentantino ne komprenis : "Ĉu mi diris Bosnio ? Kion mi diris ? Kion mi diris ?" ŝi demandis.) Ekestis ĝenerala konfuziĝo. Mi supozas ke la problemo venas de la franc-angla tradukanto, kiu tradukis "Jugoslavio" per "Bosnia". Ĉi-tie la eraro ne tro gravis - ja temis pri interetna reamikiĝo ! - sed en aliaj cirkonstancoj, mi imagas, kiel danĝera povas esti tia eraro !

S-rino Bo ne tre bone regis la anglan, kaj verŝajne tute ne la francan. Tial ŝi preparis sian paroladon sur papero, kiun ŝi legis per monotona voĉo. La demandoj de la presentantino kaj ŝiaj respondoj ŝajnis tute artefaritaj kiam ni vidis, ke ŝi nur legis antaŭ-skribitan paperon. Finfine, neniu plu atente aŭskultis tiun virinon, kiu estis viktimo de tio, ke ŝia denaska lingvo estas nek la franca, nek la angla.

Fine parolis tiu virino el Ruando, kaj estis tute klare, ke ŝi ricevis multe pli vastan aplaŭdon ol la antaŭaj. Ĉu ŝia parolado estis pli interesa ? Eble ŝi ja havis karakteron pli komunikeman, sed certe la aplaŭdo ankaŭ rilatis al tio, ke ŝi parolis la francan, kaj ke Francoj pli bone komprenis ŝin (sen iu ajn ilo) kaj povis tuj reagi ŝiajn diraĵojn (dum tiuj kiuj bezonas tradukon devas atendi la finon de la traduko antaŭ ol kompreni la diraĵon de la parolanto, kaj ofte ne havas sufiĉan tempon por reagi ĉar la parolanto plu parolas.)

Rozenn



## La nova estraro de JEFO

*Peut-être les connaissez-vous déjà, peut-être ne les avez-vous jamais rencontré, mais si vous lisez un peu la revue de l'association, vous avez forcément vu leurs noms quelque part. Aujourd'hui nous vous dévoilons tout sur ceux qui ont été élus lors de la dernière Assemblée Générale, qui a eu lieu à Paris en mars.*



**Karine,  
la présidente**

Votre présidente était toute cassée quand vous l'avez élue. Aujourd'hui, elle est enfin réparée et prête à l'emploi (de présidente de JEFO, bien sûr). Malgré les miracles de la science, elle a toujours autant de défauts et elle se goinfré toujours autant de chocolat. Ses rêves les plus fous pour JEFO : 1. que l'espéranto agrandisse l'horizon de centaines de jeunes - 2. qu'on ne dise plus qu'à JEFO on parle tout le temps en français (c'est même pas vrai ! Mais il y en a qui ne sont pas encore au courant !) - 3. que les espérantophones travaillent main dans la main à faire connaître l'espéranto, même quand ils n'appartiennent pas à notre association - 4. que je rencontre tous les membres de JEFO, même ceux d'entre vous qui jouent à cache-cache !



**Bruno,  
le vice-président**

27 ans, célibataire, habite à la campagne à... 12 km de Lyon. Il partage son temps professionnel entre la communication (édition d'un magazine, publicité) et internet. Et il partage son temps libre entre l'espéranto à la maison (lecture, création de documents, comptabilité, courriers...) et l'espéranto à l'extérieur (réunions, sorties, bricolage, achats...). Ex-

président de Jefe pendant 5 ans, il cumule encore de trop nombreuses fonctions à son goût : vice-président de UFE, trésorier de Mille et une langues, administrateur d'Espéranto-Lyon. Il souhaite désormais recentrer ses activités espéranto sur ce qui touche à la communication en France et à l'activité du KoToPo à Lyon. Et bien sûr à ses autres activités préférées (sports, cinéma, touris-me, lecture...).



**Didier,  
le trésorier**

Dix d'entre vous ont déjà utilisé le service d'acompte pour s'inscrire à l'IJK, en économisant les frais de virement international. Même si le change est fixe entre le franc français et le florin néerlandais, deux divisions de la même monnaie, l'euro, les frais fixes ont augmenté : pour la Poste, c'est 1%, avec un minimum de 55 F ! Alors si vous voulez continuer à économiser cette somme au moment de payer vos acomptes aux grandes rencontres internationales, pensez à moi (et à regarder le tableau en page 3 du dernier JI), je vous promets que j'utilise des techniques comptables plus modernes que ce cochon !



**Cédric,  
le vice-secrétaire**

Il a 27 ans, habite à Lyon, et il est tombé dans l'espéranto en 1996 (mais il ne s'est pas fait mal). Il a fait le tour de l'Europe grâce au Pasporta Servo (service d'hébergement gratuit avec des adresses dans le monde entier pour les jeunes espérantophones). Il a étudié la biologie et le marketing, et travaille actuellement pour son mémoire. Il aime faire des bulles avec le savon (ceux qui ont lu ses articles scientifiques comprendront).


**Magali,  
la secrétaire**

Magali, en bonne espionne, a le chic de brouiller les cartes. Bretonne avec un prénom provençal, française avec un nom de famille allemand qu'elle a hérité de son mari sudafricano-nami-bien, cherchez l'erreur ! Elle aime Cologne, l'Europe (y compris l'Est), l'Afrique, son métier d'attachée de direction en stratégie internationale, la confiture de pample-mousse-groseilles, les copains de JEFO, et des autres associations de jeunesse.

Ses domaines d'activité préférés pour JEFO : secrétaire, elle travaille à l'amélioration des procédures d'administration interne (gestion des membres etc), mais aussi à la circulation des informations entre les actifs de JEFO (pochette actifs), et entre JEFO et son équivalent allemand GEJ (séminaire franco-allemand) et les autres partenaires européens et hors Europe (y compris TEJO); à cela s'ajoutent les contacts avec le public (jeune, tout particulièrement dans l'est de la France) et les instances officielles (subventions, etc.)



## Regiona Mapo



### Aliĝilo por la 10a MKR

Familia nomo			
Persona nomo		naskiĝdato	
Adreso			
Poŝtkodo		Urbo	
Lando			
Telefonnumero			
Ĉifoje mi mangas viandon		o jes	o ne
<p>Mi donas atenton al la fakto, ke mia partopreno okazas proprariske kaj la organizantoj ne transprenas ajnan reponsecon pro akcidentoj kaj kostoj por serĉado, savado kaj sanigo. Estas mia propra respondeco zorgi pri adekvataj asekuroj.</p>			
Dato	Subskribo		

---

# 10ª MKR




23ª - 26ª de setembro 1999  
Felseralm (1650 m)  
Obertauern, Áustria

---

## Pri la renkontiĝo kaj ejo

Bonvenon al la 10a kaj (antaŭvideble) lasta MKR. Kiel kutime la pintoj atendas vin. Ni loĝas en komforta sporthejmo kun gimnastikejo, saŭno kaj naĝlago.



La ĉi jara MKR-ejo

## Kiel atingi la renkontiĝejon

Obertauern troviĝas laŭ la strato B 99, 16 kilometrojn sude de Radstadt. Radstadt estas IC-haltejo, de kie veturas Bundesbus al Obertauern. Pli detalajn informojn vi ricevos per la 2a informilo, kiu sendiĝos al vi post via aliĝo.

Jugendsportheim  
Felseralm  
A-5562 Obertauern

## Pri la bezonaĵoj

Kiel jam kutime vi kunportu

- monttaŭgajn ŝuojn
- varmajn kaj pluvprotektajn vestaĵojn
- dorsosakon kaj trinkujon
- ludojn, fotojn, humuron, muzikilojn, monon, ...

## Kotizo

en Eŭroj (€)	aĝo	ĝis 16.08.99	poste	surloke
Okcident	< 19	35,61	42,88	57,41
	19-30	42,88	50,14	64,68
	> 30	50,14	57,41	71,95
Orient	< 19	24,71	31,98	46,51
	19-30	31,98	39,24	53,78
	> 30	39,24	46,51	61,05


Membroj de la Aŭstria Esperanto-Junularo ricevas rabaton de € 3,63.

Ni nur povas garantii lokon al vi post ricevo de via plena pago, por partoprenantoj el la netranspagipovaj landoj post antaŭpago de minimume € 7,27.

Malaliĝo nur eblas ĝis la 31.08.99. Ĝis tiam vi rericivas vian (antaŭ)pagon minus € 7,27. Transdono de via aliĝo eblas, sed malpliĝo de la kotizo ne.

Bonvolu transĝiri la sumon al la poŝtĉekkonto 7.497.427 de AEJ ĉe poŝtĉekoficejo Wien (BLZ 60.000) aŭ sendu monbiletojn (ATS) al AEJ, P.O.B. 804, A-8011 Graz (proprariske!).

Venu al...  
La VEGETARA SEMAJINFINO



3-4a de Julio,  
ANTWERPEN

# FLEJA invitas ĉiujn al nia:

\* Serĉpromeno tra Antverpeno 3 / 7 / 1999

Kio : Esploru la historion kaj la malnovajn stratetojn de Antverpeno!  
Prezeto : 200 BF, inkluzive leĝera vespermanĝo + kafo / teo

Kadre de nia:

\* Vegetara semajnfino 3-4 / 7 / 1999

Prezeto : 900 BF, ĉion-inkluziva (promeno, manĝo, junulargastejo).  
(rabato de 100 BF por FLEJA-membroj & eksterlandanoj)

Programo:

Sabato :

Dimanĉo :

10:00 Ĝenerala membrokunveno (FLEJA)  
12:00 Tagmanĝo LVS (Varma)  
\*14:00 Serĉpromenado  
\*18:00 Vespermanĝo LVS (Pana)  
\*20:00 Premiigo + fotoj!  
\*20:30 Prelego pri vegetaraj manĝaĵoj  
22:00 Komuna ekiro al junulargastejo  
22:30 Distra: Interaktivaj ludoj...

08:00 Matenmanĝo  
10:00 Humano vegetara kuirado  
12:00 Tagmanĝo en LVS (Varma)  
13:00 Laborgrupo pri reciklado  
18:00 Vespermanĝo en LVS  
22:00 Vizito al mez-epoka trinkejo  
en la centro de Antverpeno

\* komuna programero

Aliĝilo

Nomo : \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

: \_\_\_\_\_

Mi aliĝas nur al la Serĉpromenado + vespermanĝo  
 Mi aliĝas al la tuta Vegetara Semajnfino

Mi manĝas  vegetare (ĉefe plante)  
 nepre karnivore (beste)

Rimarko: Eblos tranokti ĉe Esperantistoj antaŭ kaj post la Vegetara Semajnfino. Bv. anonci anticipe.

Sendu la aliĝilon antaŭ la 20a de junio al:

o FLEJA - Frankrijklei 140 - BE-2000 Antwerpen (BELGIO)  
o Aŭ lasu mesaĝon per e-poŝto: [lode@fel.agoranet.be](mailto:lode@fel.agoranet.be)

(\*) 900 BEF estas proksimume 150 FRF !



# ← Lastminute ! ↘

La 22an de majo, dum la kongreso de UFE en Fournols, okazis kunveno de GEE ("groupe des enseignants espérantophones"). Ni klarigis, ke kiam oni aliĝas al UFE kiel instruisto aŭ profesoro, oni rekte estas membro de GEE.

Post diskutado kun 18 membroj, ni konstatis, ke gravas rapide krei komisionon por vigligi la asocion. Efektive, GEE preskaŭ ne plu funkcias. Ĝi nur monhelpas por-infanajn pedagogiajn renkontigojn (ekz. en Grésillon, Mesnil-Saint-Père) kaj sendadon de IPR (internacia pedagogia revuo).

Tiu asocio devas zorgi pri multaj aliaj taskoj ege gravaj. Sed, unue, oni devas varbi por trovi aktivulojn kaj prepari baloton por la venonta jaro. Pro tio, tri personoj proponis sin por fari tion (René Guillaume el Gironde, Joseph Catil kaj Catherine Giangrossi el Rhône).

Ni jam listigis plurajn agadojn por la asocio. Sed... estas nur proponoj kaj aliaj ideoj kun aktivuloj estas bonvenaj :

- rilato kun ILEI,
- renovigi la statutojn,
- krei metodon por lernigi esperantan kulturon,
- varbi por trovi novajn geaktivulojn,
- komisiono por fari liston de por-infanaj kursoj en lernejoj kaj mez-lernejoj,
- internacia korespondado por infanoj (KSM),
- listigi pedagogiajn metodojn por lernigi esperanton,
- rilatoj kun instruistaj sindikatoj.
- organizi semajnfinojn por ge-instruistoj

Se vi deziras pli da informoj, partopreni aŭ proponi ideojn, kontaktu min :

Catherine GIANGROSSI (*redaktorino de "La Krokodileto" por la plej junaj*)

1 rue Trarieux

B.P. 3019

FR-69394 LYON Cedex 03

tel./faks +33 4 72 36 07 14

[cgiangrossi@esperanto.org](mailto:cgiangrossi@esperanto.org)

# La Jefe-Butik'

**esperanto**  
*Jeunes*

La Jefe-Butik'  
4 bis rue de la Cerisaie  
75004 Paris

Vi povas  
mendi ĉiujn  
varbilojn,  
broŝurojn,  
dosierujojn,  
panelojn...  
ĉe UFE.



Prezo (inter krampoj: por Jefe-membroj)

## ..... Libroj .....

La eta reĝo (de Markos)	:	40	(20)	x	=
IMO (de Markos)	:	38		x	=
Arnau-komiksoj* (2 albumoj)	:	60	(55)	x	=
Arnau "La bona etoso"	:	27		x	=
La Danĝera Lingvo	:	195	(150)	x	=
